

BULGARA ESPERANTISTO



ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

En la numero:

ESTU ĈIAM
LA SUNO!



LA UNUA SPURO



JUNA
ESPERANTISTO



VANKUVERO — LA
KONGRESURBO



100 JAROJN
ESPERANTO



INFANA PAĜO



NI RECENZAS



ENLANDA MOVADO



DISTROJ



JARO 53 • N-RO 6 • JUNIO • 84



ESTU ĈIAM LA SUNO!..



Deklamas Daniel Nedjalkov el Kazanlâk.
Foto: Hristo Metev

LEV OŜANIN

ESTU ĈIAM LA SUNO

Suno kaj hel'
de la ĉiel' —
jen la pentraĵo de knabo.
Pentris li mem —
eta ĝojul'
skribis li mem
en angul':
„Estu ĉiam la suno,
estu ĉiam ĉielo,
estu ĉiam patrino,
estu ĉiam mi mem!“

Kara amik',
bona amik',
tiel ni volas la pacon!
En ĉiu hor'
kun la fervor'
firme ripetas la kor':
„Estu ĉiam la suno,
estu ĉiam ĉielo,
estu ĉiam patrino,
estu ĉiam mi mem!“

Foru alarm',
bruo de arm',
kiu timigas la homojn.
Kronu nin nur
varma lazur':
diru ni pri la futur':
„Estu ĉiam la suno,

estu ĉiam ĉielo,
estu ĉiam patrino,
estu ĉiam mi mem!“

Kontraŭ perfid',
kontraŭ milit'
por niaj knaboj ekstaru!
Suno kaj bon'
por ĉiu dom' —
tiel ordonas la hom'!
„Estu ĉiam la suno,
estu ĉiam ĉielo,
estu ĉiam patrino,
estu ĉiam mi mem!“

El la rusa: K. GUSEV

PETRO POLIŜČUK

SAVU INFANOJN!

Por feliĉo de niaj infanoj,
Por sekuro de la tuta mondo,
Ni nun firme kunligu la manojn,
Kreante potencon pacrondon!

Ni neniam forgesu teruron
De la atombombado!... Viktimojn!...
Ili lasis eternajn ja spurojn
Kaj cikatrojn en homaj animoj!

La homaro soifas nun Pacon;
Homoj estas ja, kontraŭ militoj!...
La batalo por paco, aŭdaca,
Estas kerno de ĉies spirito!

Do, en niaj propraj manoj
Estas sorto de infanoj!

MIKA SREBROVA

INFANO

Kun brile ridetantaj okuletoj
etendas la infano du manetojn,
la kolon brakumante de l'patrino,
kaj ŝi mutigas pro ekstaz-kulmino.

Vespere kuŝas ĝi en lit' malgranda,
kviete endormigas, ne plorante.
La luno ridetante gaje lumas
kaj per radioj siaj ĝin brakumas.

L'infano kreskas en la Patrolando
ĉe ties zorg' tenera kaj konstanta:
infangardenoj vastaj kaj vartejoj,
junpioniraj ripozkampadejoj.

Precipe zorgis Dimitrov genia
pri la infana vivo harmonia;
parolo lia, kiel fajra ondo
sin disvastigis tra la tuta mondo.

Por la infanoj de l' popolamasoj,
sendiference de kolor' kaj rasoj,
serena estu la ĉielekrano
kaj estu ĉiam paco por l'infano!

El la bulgara: SIMEON M. SIMEONOV



BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

JARO 53

JUNIO

6 • 1984

ESPERANTO KAJ INFANOJ

Dum la lastaj jaroj la E-movado en nia lando sendube uniĝas. Do, la Tago de Infanoj — 2-a de junio, estas bona preteksto denove pridiskuti la temon pri altiro de infanoj kaj adoleskantoj. Ne estas sekreto, ke en la infanaĝo oni plej facile lernas fremdajn lingvojn, kaj la interesoj formiĝas dum tiu vivperiodo ofte akompanas nin dum la tuta vivo.

Kiel nian plej grandan sukceson en la laboro kun infanoj ni, kompreneble, devas mencii la instruadon de Esperanto en 8-a kaj 9-a klasoj de la mezlernejoj, fare de spertaj profesiaj instruistoj. Pri tio ni multfoje skribis. Ĝi estas elprova formo, kiu jam donas fruktojn.

Alia bona formo por instruado de Esperanto al infanoj (kiu promesas fariĝi tradicio), estas la vintraj kaj printempaj feriaj E-kursoj en Pisanica, kie ĉe tre bonaj kondiĉoj la infanoj samtempe ripozas kaj lernas Esperanton. Similaj kursoj okazis pasintjare, kaj ankaŭ en aprilo ĉijare.

Novajo ĉe ni estas la instruado de Esperanto al infanoj en antaŭlerneja aĝo. Pri sia laboro sur tiu kampo lastatempe informas Maria Manolova, instruistino en 152 infangardeno en Sofio: „En Kolarov-subdistrikto en la ĉefurbo oni enkondukis eksperimentan lernadon de Esperanto en la Centran Infangardenon 152. Mi komencis kun grupo el 12 infanoj, 6—7-jaraj, sed iom post iom la intereso inter la infanoj kreskis. Mi estis subtenata de la gepatroj kaj la socio. Mia grupo nun nombras dudek infanojn, kiuj atendas la E-kursojn kun granda intereso kaj deziro“.

Interesa formo de laboro kun infanoj kaj adoleskantoj estas ankaŭ la amatora artagado — dum la lastaj jaroj infanaj grupoj partoprenis la Nacian Revuon de E-Parolo kaj Kanto, la Botev-recitalon k.a. Ĉi-jare, dum la Nacia Revuo de E-Parolo kaj Kanto en Plovdiv tre bone sin prezentis iuj ensembloj kaj apartaj plenumantoj — ekzemple Daniel Nedjalkov el Kazanlâk (dek-lamado), la Infana Folkloro Ensemblo el vila-

ĝo Gorno Draglište, distrikto de Blagoevgrad, Infana Danc- kaj Kantensemblo el Bojurište (apud Sofio) k.a. Eĉ se ne ĉiuj rezultoj estas tre bonaj kaj esperigaj (kiel, bedaŭrinde, nin informis la ĵurio), tiu partopreno de la infanoj tamen sendube kreas ĉe multaj el ili daŭran intereson al Esperanto.

La infana E-aktivado evoluas ankaŭ en alia direkto — ni havas antaŭvide partoprenon de bulgaraj infanoj-esperantistoj en la Asembleo „Standardo de la Paco“. Nia grupo jam partoprenis la Asembleon en 1982, kvankam tre modeste. Sed nun oni multe pli serioze pripensas nian partoprenon en la antaŭstaranta Asembleo „Standardo de la Paco“. Kiel ni informigis, D. Terziev, gvidanto de la Bulgara E-Horo, kontaktis kun la Centro „Standardo de la Paco“, proponante „direkti sian atenton al la E-movado inter infanoj, altiri al partopreno en la antaŭstaranta Infana Asembleo „Standardo de la Paco“ infanojn-esperantistojn en la tuta mondo, garantii partoprenon de bulgaraj infanoj-esperantistoj en la kultura programo de la Asembleo“.

Kaj fine ni menciu ankaŭ la plej novajn, ankoraŭ ne sufiĉe elprovitajn formojn — fondo de E-klubo, ĉe la Klubo de Internacia Amikeco en lernejoj kaj junularaj kulturdomoj, inteŝanĝoj de niaj infanaj E-grupoj kun grupoj el aliaj landoj, kie ekzistas similaj kluboj ktp. Ni eksciis, ke tiurilate seriozan preparlaboron en Kolarov-subdistrikto de la ĉefurbo faras nia nova samideano ing. Pacov; li intencas fondi E-klubon en la Junulara Domo „L. Karastojanova“, organizi E-kursojn kaj amatoran artagadon. Ni esperas baldaŭ ekscii pri realigo de tiuj liaj intencoj.

La laboro kun infanoj kaj gejunuloj estas la estonto de nia movado, en iliajn manojn ni transdonos la stafeton.

Konsiderante tiun fakton, la redakcio de „Bulgara Esperantisto“ ĉiam bonvole akceptos informojn pri la laboro kun infanoj kaj junuloj, kaj donos al ili lokon en la revuo.



„LI LASIS LA UNUAN SPURON...”

(Memore al Vâlko Uzunov)
1877—1943



Vâlko Uzunov naskiĝis en vilaĝo Siroka Lâka en 1877. Elementan lernejon li finis en sia naskiĝloko. Lia patro Peju Uzunov estis tajloro kaj laboris en la vilaĝoj Breze, Beden, Nastan k.a., kiuj ĝis 1912 estis en la limoj de Turkio. Lin akompanis ankaŭ lia filo Vâlko. La patro deziris instrui al li sian metion, sed Vâlko avidis al pli alta instruisteco. Laŭ rekomendo de lia instruisto Angel Popgeorgiev, Vâlko estas akceptita lerni senpage en la unua bulgara agrikultura lernejo en vilaĝo Sadovo.

Fininte la lernejon en Sadovo, li komencas labori kiel instruisto en vilaĝo Goljam Ĉerdak, distrikto de Plovdiv. Ofte vizitante Plovdiv, Uzunov starigas kontaktojn kun progresemaj junuloj kaj socialistoj, ĉeestas prelegojn de Dimităr Blagoev, trafas la medion de la unuaj esperantistoj. Kun grandega

intereso li legas verkojn de la rusaj verkistoj-demokratoj, konatiĝas kun la „Kapitalo“ de K. Marks kaj kun la „Komunista Manifesto“, estiĝas arda agitado kaj defendanto de la socialismaj ideoj. Al la internacia lingvo Esperanto Uzunov rigardas kiel al rimedo por interkomunikiĝo de homoj el diversaj landoj, por unuiĝo de la laboruloj, por defendo de iliaj klasaj interesoj en la kondiĉoj de kapitalisma ekspluatado. Starante sur similaj ideoj pozicioj, li komencas lerni Esperanton, korespondas kun ties kreinto d-ro L. Zamenhof kaj kun aliaj esperantistoj el diversaj landoj.

La Interaliancana Milito kaj la Unua Mondmilito, en kiuj Uzunov partoprenas, multe kontribuas por stabiliĝo de la socialisma mondkoncepto. En unu el la leteroj, kiujn li sendas al sia edzino el la fronto, li skribas: „Vi suferas, ankaŭ ni suferas tie ĉi, sed kion fari... La milito alportas nenion alian krom suferoj“. Li estas afliktita de la ĥolera epidemio, kiu senindulge falĉas la soldatojn sur la fronto.

Reveninte el Plovdiv-distrikto en sian naskiĝlokon, Uzunov dum tri jaroj estas instruisto en vilaĝo Stojkite (1908—1912), kaj pli malfrue, ĝis sia emeritiĝo — en vilaĝo Mahmutica.

Vâlko Uzunov ofte veturas al Ĉepelare, renkontiĝas kun komunistoj kiel Todor Pakulev, Dimităr Peev ka. Per Peev li ricevas kaj disvastigas progresemajn gazetojn, revuojn kaj librojn. Dum la sama periodo Uzunov subtenas kontaktojn kun la esperantistoj Petăr Pamporov el Smoljan, Enjo Edrev, agronomo el Ustovo, kiu en 1928 gvidis la unuan kurson de Esperanto en la meza parto de Rodopi-montaro, kun E-aktivuloj el Plovdiv ka. Ankaŭ Uzunov intencis malfermi E-kurson en Siroka Lâka. Por la celo li havigis al si la Lernolibron de Esperanto por Bulgaroj, aperintan en 1889. Tamen, pro diversaj kaŭzoj, tiu lia ideo ne realiĝis.

Uzunov, homo kun progresemaj ideoj, kiu havas kontaktojn kun partiaj funkciuloj, loĝas en la malproksima regiono de Rodopi-montaro. Tial post la frakaso de la Septembra Ribelo 1923, ĉe li trovas azilon persekutataj ribeluloj el vilaĝo Krâsteviĉ, distrikto de Plovdiv. (Unu el ili, per la helpo de Uzunov kaj de progresemaj agraranoj el Siroka Lâka, transiras la grekan landlimon kaj el Greklando forveturas al USSR. Dum la naci-liberiga movado antaŭ la Naŭa de septembro 1944 li nelegale venas Bulgarion kaj sub la nomo DED estiĝas komandanto de partizantaĉmento „Anton Ivanov“). Pro tiu sia agado — ka-

ŝado de komunistoj, V. Uzunov estas arestita kaj lin minacas serioza danĝero. Lin savas la instruisto Georgi Najdenov, kiu avertas liajn familianojn kaŝi ĉion, kio povus konfirmi la motivojn por lia aresto kaj donus pretekston por torturi lin.

La domo de Vâlko Uzunov estis bruligita de la faŝistaj ĝendarmoj. En la incendio forbrulis lia granda biblioteko kaj ĉiuj liaj dokumentoj.

Sed lia faro estas viva, ĉar Uzunov instruis al siaj lernantoj, kaj ankaŭ al siaj propraj

infanoj modestecon kaj fidelecon al la socialismaj ideoj.

En siaj rememoroj Kalin Abraŝev, progresema pedagogo-komunisto kaj kolego de Vâlko Uzunov, skribas: „Siroka Lâka estas naskiĝloko de multaj eminentaj agantoj el la epoko de la Bulgara Renaskiĝo, de multaj kleraj konstruantoj de ĵus liberigita Bulgario, sed rilate la socialismajn ideojn, Vâlko Uzunov lasas tie ĉi la unuan spuron“.

STOIL SEDJANKOV,
merita instruisto

TRIBUNO DE LABORISTOJ-ESPERANTISTOJ

(55 jarojn „Balkana Laboristo“)

En 1984 finiĝas 55 jaroj post la apero de la unua numero de revuo „Balkana Laboristo“ (en bulgara lingvo kaj en Esperanto). En daŭro de tri jaroj ĝi multon kontribuas por starigo de la internacia lingvo Esperanto en servo de la klasbatalo kaj por organizo de la bulgaraj esperantistoj sub la standardo de la Bulgara Komunista Partio.

Fine de la 20-aj jaroj, kiam en nia lando komenciĝas nova revolucia leviĝo, en la tuta lando oni komencas organizi kaj fondi laboristajn esperantistajn societojn, celantajn kunligi Esperanton kun la klasbatalo. Ili ekzistas izolate, ne sciante ĝuste kien direkti siajn strebojn. Estas akre sentata la bezono de akordigo de ties agado. La sofiaj progresemaj esperantistoj, konataj sub la nomo laboristoj-esperantistoj, kiuj staris plej proksime al la gvidantoj de la amasaj organizaĵoj, gvidataj de la partio, plej klare konscias tiun ĉi bezonon. Ili prenas decidon pri eldonado de revuo, titolita „Balkana Laboristo“, kiu devis estiĝi centro de la laborista esperantista movado en Bulgario. La Sofia laborista esperantista societo komisiis la redaktadon de la nova revuo al la studentoj-esperantistoj Nikola Aleksiev, kiu jam havas sperton kiel redaktoro de gazeto „Studenta Tribuno“, kaj al Atanas Lakov. Ili kun entuziasmo akceptas la taskon. Nikola Aleksiev prenas sur sin la tutan laboron pri havigo de materialoj kaj pri altiro de novaj aŭtoroj. Li starigas kaj subtenas kontaktojn kun korespondantoj de la laboristaj esperantistaj grupoj en la tuta lando, tre gravaj pli malfrue, kiam estiĝis aktuale la tasko pri fondado de Laborista Esperantista Asocio, al kiu li estas unu el la iniciatintoj kaj fondintoj. Li verkas ankaŭ la pliparton de artikoloj lige kun utiligo de Esperanto en la partia laboro. Atanas Lakov redaktas precipe la literaturajn

materialojn. Ĉirkaŭ ambaŭ redaktoroj formiĝas redakcia grupo, konsistanta el Simeon Petrov — administranto de la revuo, Pelin Velkov kaj Panajot Kolev. Aktivaj kunlaborantoj de la revuo el Sofio estas Asen Grigorov, Lazar Panov, Ljubomir Ognjanov — Rizor, Veska Krâsteva kaj la blinda esperantisto Stefan Nejkov, kaj el la lando — Ĥristo Gorov, Dimitâr Zlatarski, Kostadin Ĉičanov, Vasil Bozarov k.a. Paralele kun konstato de la nombro kaj organiza stato de la laboristaj esperantistaj societoj kaj akordigo de ties agado la revuo starigas kiel sian taskon ankaŭ la marksisman-leninisman klerigadon de la esperantistoj — en sia plimulto progresemaj homoj. Dank' al sia serioza laboro tiurilate, ĝi baldaŭ atingas gravajn sukcesojn. La pliparto de la membroj de la tiam ekzistanta politike neŭtrala esperantista asocio forlasas ĝiajn vicojn kaj ekagas aktive en la laboristaj esperantistaj societoj. Kreiĝas premisoj por fondo de esperantista organizaĵo sub influo de la Partio — nome Laborista Esperantista Asocio, kiu estas fondita en 1930 laŭ iniciato de revuo „Balkana Laboristo“. La revuo estiĝas ĝia organo kaj plu disvastigas la partian veron inter ties membroj kaj inter la multnombraj personoj, kiuj pasas tra la kursoj por lernado de la lingvo. „Balkana Laboristo“ plu sekvas sian linion de popularigo de la socialismaj akiraĵoj de USSR — tiam sola en la mondo laborista-kamparana ŝtato, rakontas (surbaze de sciigoj en la internacia Egazetaro kaj de korespondataĵoj de bulgaraj esperantistoj) pri la sukcesoj de la sovetalando, pri la libera kreolaboro de la sovetaj homoj. Ĝi alte levas sian voĉon en defendo de la unua en la mondo socialisma ŝtato, kontraŭ la imperiismaj atencoj, en defendo de la paco. Per siaj multnombraj korespondataĵoj kaj materia-

loj, respegulantaj la evoluon de la E-movado en Sovetunio kaj de la laborista E-movado en alilando la revuo kontribuas por edukado de la bulgaraj esperantistoj en spirito de proleta internaciismo.

La fundamenta tasko — edukado de la esperantistoj kaj de la laboruloj en spirito de amo kaj fideleco al la Bulgara Komunista Partio, kiun revuo „Balkana Laboristo“ starigas al si jam de la sia unua numero, ĝi plenumas tre sukcese. La enhavo de ĝiaj tri jarkolektoj klare kaj nedusence montras ĝian intiman aligitecon al la partiaj celoj kaj taskoj, al la bezonoj de la momento. Inter la plej grandaj meritoj de revuo „Balkana Laboristo“ estas ankaŭ tiu, ke ĝi transformiĝas en centron por preparado de ĵurnalismaj kadroj, ne nur esperantaj, sed ankaŭ por la proleta gazetaro ĝenerale. Ties eldonadon partoprenas ankaŭ neprofesiaj ĵurnalistoj kaj kunlaborantoj el Sofio kaj el la tuta lando. Pasinte tra spertiĝo ĉe „Balkana Laboristo“, jam harditaj, ili fordonas siajn fortojn por disfloro de la gazetaro de la Laborista Esperantista Asocio —

„Internacia Lingvo“ kaj „Mejdunaroden Rab-selkor“ („Internacia Laborista-Kamparana Korrespondanto“). Samtempe ili aktive kunlaboras al la internacia Esperanta kaj la bulgara proleta gazetaro. Ilia aktivado en la gazetaro, komenciĝinta en „Balkana Laboristo“ daŭras dum la 30-aj jaroj ĝis la Naŭaseptembra venko en 1944, post kiu ili jam okupiĝas pri respondeciga ĵurnalisma agado.

En 1931, plenuminte sian destinton de agitante de la partia vero kaj organizanto de la laboristoj-esperantistoj en nia lando, revuo „Balkana Laboristo“ ĉesas aperi. Ĝiaj eldonistoj kaj redaktoroj, profitante la akiritan sperton, kreas ankoraŭ pli interesajn kaj originalajn eldonojn, kiuj gajnis la amon kaj estimon ne nur de la laboristoj-esperantistoj, sed ankaŭ de miloj da bulgaraj legantoj.

Revuo „Balkana Laboristo“ — fondinto de la laborista E-ĵurnalistiko, donis komencan puŝon por praktika starigo de Esperanto en servo de la batalo kontraŭ kapitalismo kaj faŝismo.

DIMITĀR PAPAŬOV

100 jarojn esperanto

MOMENTOJ EL LA HISTORIO DE ESPERANTO EN PLEVEN

En Pleven Esperanto penetris dank' al progresemaj intelektuloj. Unua komencis propagandi Esperanton la komercisto Kosta K. Avramov. Li organizis E-kurson, kiu ekfunkciis la 8-an de decembro 1903.

Unuaj gvidantoj de la E-movado en Pleven estas Kosta Avramov, P. Vaska, Petĉar Evlogiev Barakov, Dimitĉar Karaivanov, Ĥristo Paŝovski kaj M. Tiŝev.

En la somero de 1905 Kosta Avramov estiĝas membro de la Internacia E-Societo „Pacifisto“ en Parizo. Dum la periodo antaŭ la Balkana Milito tre aktive laboras Ivan Krestanov, Gunĉo Gunev, Ĥristo Genĉev, Simo Pekov Simov (poŝtoficiisto), Stefan Petkov Simov, Angel Simeonov, d-ro Rjaĥovski (advokato el urbo Levski), Ilija Bĉardarov el Pleven.

Dum diversaj periodoj aktive laboras ankaŭ Malĉev, Dimitĉar Todorov, St. Kojumĝiev, Kosta Peĉigargov, Simeon Ĉorbaĝiev. Tre intimaj estis ankaŭ la kontaktoj kaj la interrilatoj kun la Bulgara Ruĝa Kruco, kun la abstinencula kaj sporta movado, kun la turista

societo. Eĉ estis formita futbalteamo el esperantistoj.

Ĝis 1940 aktivuloj de Esperanto estis Ljuben Dunĉev, Mara kaj Nadeĵda Kruŝovski, Rajna Ganeva, Konstantiv Konstantinov, Veselina Petkova, Moris Basan, Mara Paskaleva, Georgi Panov (agronomo). Dimitĉar Popov, Leonid Jordanov, Petĉar Mitkov, Petko Velev, Veliko Matev, d-ro Dimitĉar Vasilev Dimitrov (veterinara kuracisto).

Tre brila estis la agado de la plejado de peirentaj kontraŭfaŝistoj-esperantistoj el Pleven, nome: Georgi Petrov (Goŝo), Ĥristo Kĉrpaĉev, Stojan Edrev, Slavi Aleksiev, Cvetan Spasov, Lenko Miŝev, Cvetko Georgiev, Ljuben Veŝkov, Liljana Bĉardarova, Aleksandĉar Paŝev, Canko Stanĉev, Binka Paraŝkevova, Penĉo Kostadinov, Adil Derviŝev, Mara Denĉeva, Donĉo Aleksandrov kaj multaj aliaj. Rimarkinda estas la versaĵo de Cvetan Spasov „Esperanto“.

En 1939 en Pleven okazas la 26-a kongreso de BEA, kaj la 11—14-an de junio 1964 — la 36-a kongreso de BEA, en kies kadro okazas

la unua bulgara infana E-kongreso kun la partopreno de pli ol 100 infanoj.

Post la popola venko je la 9-a de septembro 1944 multaj el la aktivuloj-esperantistoj jam ne estis vivaj, pro kio ekestis certa stagnado en la movado. Nur en 1958 komenciĝas vigliĝo de la E-agado sub la gvido de la fama kontraŭfaŝisto Ljuben Dunčev kun la Partopreno de Ivan Daskalov, Zdravko Velikov, Venecij Georgiev.

Lige kun la 60-jariĝo de la E-societo en Pleven, en 1964 ĝi estis distingita per la ordeno „Cirilo kaj Metodij“ — I grado.

En 1966 30 personoj partoprenas la UEA-Kongreson en Budapeŝto.

Granda estas la supreniro de la E-movado en Pleven-distrikto kaj en Pleven dum la lastaj dek jaroj. Dum tiu periodo ĉiujare oni organizas po dekon da kursoj, en kiuj la lingvon studas po pli ol cent kursanoj. Nur dum la jaroj de popola regado en Pleven Esperanton lernis pli ol 2—3 mil personoj.

Nun la lernado de Esperanto en Pleven, speciale inter la junularo, havas amasan karakteron. Oni instruas ĝin fakultative en multaj lernejoj.

En Pleven-distrikto la E-movado estas gvidata de Distrikta Estraro kun prezidanto Venecij Georgiev. Nur sur la teritorio de Pleven

funkcias 5 memstaraj societoj: „Eterna Amikeco“ kun prezidanto d-ro Emilija Kanjovska, „Kooperativo“ kun prezidanto Pantalej Gospodinov, „Mizio“ kun prezidanto Orlin Gospodinov, fervojista societo „Monda Paco“ (prezidanto Georgi Vančev) kaj societo „D-ro Zamenhof“ ĉe la Medicina Akademio (prezidanto Tanja Belova). La 5 societoj havas pli ol 200 organizitajn membrojn.

En Pleven-distrikto funkcias E-societoj en urboj Levski kaj Nikopol kaj en vilaĝoj Begleĵ, Pordim, Borislav. Antaŭstaras fondo de memstaraj societoj en vilaĝoj Koilovci, Ĉomakovci kaj Pobeda (kie okazas la Internacia Junulara E-Brigado).

La fenestroj de la E-klubejo en Pleven, situanta ĉe str. „Canko Cerkovski“ 14, ĉiuvespere lumas ĝis malfrua horo. Entuziasmoplenaj E-instruistoj instruas la lingvon al multnombraj dezirantoj el diversaj generacioj.

La E-movado en Pleven kaj en la distrikto manifestiĝas ne nur en instruado kaj propagando de Esperanto, sed ankaŭ en aktiva sociopolitika agado kun la partopreno en multaj naciaj kaj internaciaj aranĝoj, celantaj fratecon inter la popoloj kaj aktivan batalon por defendo de la mondpaco.

DIMITAR KAMENOPOLSKI

BRAJLAJ KAJ SONBENDAJ E-ELDONOJ EN BULGARIO

Antaŭ 76 jaroj Esperanto trovas siajn unuajn adeptojn inter la bulgaraj nevidantoj. Sed la bulgara burĝa ŝtato ne zorgis pri la blinduloj kaj ili vivis ĉe malfacilaj kondiĉoj. Pro tio oni preskaŭ ne povas paroli pri brajlaj eldonoj en Esperanto. Ĝis la venko de la socialisma revolucio en Bulgario en 1944.

La unuaj nevidantoj, kiuj komencis lerni Esperanton en 1907, estis lernantoj en la Stata Instituto por Blinduloj en Sofio.

La unuaj E-brajlaj eldonaĵoj estis mane skribitaj. Ili estis lernohelpiloj.

En 1909 du lernantoj el la instituto mane transskribas unu malgrandan Esperanto-Bulgaran Vortaron. Estas transskribita mane ankaŭ lernolibro.

En 1910 du blindajesperantistoj—Nikola Torbov (li estas la unua bulgara blinda esperantisto) kaj Stefan Nenkov, kompilas la unuan Bulgaran-Esperantan Vortaron por blinduloj. Ĝia dua parto estas preparita en 1913.

En 1913 la studento-esperantisto Panajot Kolev, granda amiko de la blinduloj, kiu

scipovis la brajlan skribon, mane transskribis por siaj blindaj samideanoj la Esperantogramatikon.

La 6-a de majo 1921 estas grava momento en la vivo de la bulgaraj esperantistoj-blinduloj. Ok nevidantaj esperantistoj fondas societon „Balkana Stelo“. Dum multaj jaroj ĝi estas certagrade nacia organizaĵo por la bulgaraj blindaj esperantistoj. De 1921 ĝis 1944 en la Stata Instituto por Blinduloj oni oficiale instruas Esperanton, sed, bedaŭrinde, E-brajlaj literaturo en Bulgario ne estas eldonata.

En 1928, verŝajne laŭ iniciato de membroj de „Balkana Stelo“, revuo „Esperanta Ligilo“, oni eldonas „Bulgaran Antologion“. Ĝi enhavas verkojn de tri famaj bulgaraj naciaj verkistoj — Ivan Vazov, Ĥristo Botev, Aleko Konstantinov.

Dum 1931 en la Stata Instituto por Blinduloj Esperanton instruas nia fama vidanta E-poeto Asen Grigorov. Laŭ lia iniciato kaj kun la permeso de la direktoro de la instituto estas mane eldonita la unua bulgara brajla revuo en Esperanto — „Fajrero“. Ĝiaj redaktoroj estas la

lernantoj Georgi Georgiev kaj Kiril Manov (nun k-do Manov estas nia multestimata esperantisto-veterano. Li aktive partoprenas en la vivo de la Bulgara Esperantista Asocio). La revuon oni eldonis en tri ekzempleroj kaj ĝin legis ĉiuj blindaj esperantistoj en la lando. De ĝi bedaŭrinde aperis nur tri numeroj.

En 1936, denove dank' al membroj de „Balkana Stelo“, aperas la unua brajla bulgara libro en Esperanto — „Elektitaj Versaĵoj“ de la bulgara poeto-revoluciulo kaj demokrato Hristo Botev. Ĝi enhavas antaŭparolon, ses versaĵojn, fragmenton el la politika felietono „Tio ĉi atendas vin“ kaj glosaron. Nun tiu ĉi libro estas tre valora bibliografia raraĵo. La libro estas presita en la tipografio de Herald Thelander en Svedio.

La bulgaraj nevidantoj estas tre dankaj al Thelander. Li presis ankaŭ la unuan bulgaran brajlan revuon „Vestitel“ („Heroldo“) — 1933—1937.

Post la venko de la socialisma revolucio la nevidantaj homoj en nia lando estiĝis egalrajtaj kaj aktivaj membroj de la nova socio. Grandan helpon ili ricevis ankaŭ de la gvidanto de la bulgara popolo Georgi Dimitrov.

En 1951 estis fondita Asocio de la Blinduloj en Bulgario (ABB), kiu fariĝis materiala kaj morala bazo por evoluo de la aferoj de la bulgaraj nevidantoj. Ankaŭ por la blinduloj-esperantistoj komenciĝis nova periodo.

En 1958 en Plovdiv estis fondita E-societo „Lumo“. Pasintjare ĝi solene festis sian 25-jariĝon. En 1963 kaj 1978 en Bulgario okazis Internaciaj Kongresoj de Blindaj Esperantistoj. En 1980 en Varna estis fondita societo „Espero“. La nevidantaj bulgaraj esperantistoj estas membroj de la Bulgara Esperantista Asocio kaj aktive partoprenas ĝian vivon.

La Asocio de la Blinduloj en Bulgario (ABB), kiu donas ĉiuf flankan helpon al la blindaj esperantistoj, ankaŭ zorgas pri eldonado de brajla E-literaturo kaj pri surbendigado. Ĉe la Centra Konsilantaro de ABB funkcias Komisiono pri Esperanto. Ĝia prezidanto estas la nevidanta Esperanto-poeto Todor Soŝev.

En 1963 estas eldonita la unua lernolibro por komencantoj — 4 volumoj (la kvara volumo estas vortaro), aŭtoroj — Iv. Sarafov kaj S. Hesapčiev, vidantaj esperantistoj. La lernolibro estas reeldonita ankaŭ en 1967, 1973, 1974, entute 180 ekzempleroj.

En 1976 estas eldonita granda „Esperanta-Bulgara Vortaro“ — 12 volumoj, 80 ekzempleroj, aŭtora kolekto. Unu volumo kostas unu leŭon.

En 1977 estas eldonita nova lernolibro por komencantoj kaj lernantoj, aŭtoroj — la vidantaj esperantistoj K. Vălev, J. Markov, I. Sarafov — 3 volumoj, 80 ekzempleroj, unu volumo kostas unu leŭon.

En 1978, okaze de la 46-a IKBE, aperis tri eldonaĵoj: „Elektita Bulgara Prozo kaj Poe-

zio“, redaktoro — la ĉefsekretario de BEA Kunčo Vălev — 200 ekzempleroj, „Kongresa Libro“ — 200 ekzempleroj, „Esperanto-Bulgara Konversacilibro“ — 200 ekzempleroj. Ĉiuj kongresanoj ricevis ilin. Post la kongreso multaj dezirantoj el aliaj landoj ankaŭ ricevis ilin. Tiuj ĉi eldonaĵoj estis senpage.

En 1979 estas eldonita malgranda „Bulgara-Esperanta Vortaro“ de Asen Grigorov, tri volumoj, 80 ekzempleroj, unu volumo kostas unu leŭon.

En 1982, laŭ iniciato de la Komisiono pri Esperanto de ABB, lige kun la 40-a datreveno de la perejo de Nikola Vapcarov — fama proleta poeto-antifaŝisto, estis eldonita 1 volumo de liaj versaĵoj en 100 ekzempleroj. Prezo: 1 leŭo. Multaj samideanoj kaj bibliotekoj el alilando ricevis ĝin senpage. Pro la granda intereso al la libro ĝi estos reeldonita en 30 ekzempleroj.

Dum la kuranta jaro aperos du eldonaĵoj: „Anekdotoj pri gabrovanoj“ — 1 volumo, 120 ekzempleroj (prezo: 1 leŭo), „Adresaro de la Blindaj Esperantistoj en Bulgario“, eldonata unufoje en nia lando, 150 ekzempleroj.

Parolante pri bulgaraj brajlaj E-libroj ni devas diri, ke grandan meriton pri ilia realigo havas nia estimata samideano Tanja Mileva, kiu estas teknika redaktoro kaj tipografo de ĉiuj eldonaĵoj.

La sonbenda literaturo en Bulgario havas tute nelongan historion.

En 1976 estas surbendigita „Esperanta Gramatiko“ de Violin Oljanov — 7 bendoj, 4 ekzempleroj. Iom poste estas surbendigita „La tuta Esperanto“ de Seppik, 8 bendoj, 4 ekzempleroj.

En 1978 estas surbendigita „Esperanto-Lernolibro por Komencantoj kaj Lernantoj“ de Vălev, Sarafov, Markov. Ĝi aperis pri bendoj kaj sur kasedoj — 7 bendoj, 14 kasedoj po 4 ekzempleroj. En 1983 ĝi estas reeldonita ankaŭ sur kasedoj en 4 ekzempleroj.

Ekde 1979 en Bulgario ABB surbendigas la ĉefan presorganon de BEA „Bulgara Esperantisto“, 2—3 kasedoj en 9 ekzempleroj. Je la fino de ĉiu numero oni surbendigas koncizajn interesajn materialojn el revuo „Esperanto“ kaj gazeto „Heroldo de Esperanto“.

La sonbendan literaturon oni surbendigas en la Sonbenda Centro de ABB en Sofio. Ĉiujn surbendigaĵojn legas la konata bulgara aktoro-esperantistino Belka Beleva.

La sonbenda literaturo ne estas vendata. Pri ĝi disponas la fonotekejoj de ABB kaj ĉiu ĝia membro povas ricevi bendojn aŭ kasedojn laŭ abonsistemo.

En 1983 aperis unu kasedo kun plenumoj de la kanta grupo ĉe E-societo „Lumo“ — Plovdiv, kaj de famaj kantistoj, kiuj kantas E-kantojn.

VLADIMIR JELEV

KONATIĜU: METODI ANGELOV — PENTRISTO



Kun tiu blondhara, ĉarme ridetanta junulo mi konatiĝis dum vizito al Tutnacia Ekspozicio de Afiŝoj, Grafikaĵoj kaj Karikaturaj aranĝita en la grandega halo de Sofia Centra Stacidomo, kiun li partoprenis per kelkaj siaj grafikaĵoj kaj karikaturaj. Talenta profesia pentristo, Metodi Angelov estas esperantisto — aktivulo de Bulgara Esperanto-Junularo kaj kunlaboranto de „Bulgara Esperantisto“, Mi petis lin prezenti sin per kelkaj vortoj. kiujn mi citas ĉi-sube:

„Mi estas 26-jara, mi loĝas kaj laboras en urbo Plovdiv. Kiel gimnaziano mi tre ŝatis sporton — precipe malpezan atletikon. Mi eĉ gajnis kelkajn medalojn. Sed jam kiel infano mi ŝatis pentri. Kiam mi finis gimnazion, mi firme decidis elekti la vivovojojn de pentristo. Unu jaron mi studis en la universitato en Veliko Tŕrnovo kaj poste finstudis la Pentroartan Akademion en Sofio — fakon „grafiko“. Granda evento en mia vivo estis mia konatiĝo kun Esperanto. Mia unua instruisto estis Hristo Dolĉinkov el Veliko Tŕrnovo. En Sofio mi vizitadis la kurson de Kunĉo Vălev, kiu multe helpis al mi perfektigi miajn ligvokonojn. Mi havis la feliĉon partopreni en 1978 la 34-an TEJO-Kongreson en Veliko Tŕrnovo kaj la 63-an Universalan Kongreson de Esperanto en Varna. Neforgeseblaj estas la kongresaj tagoj! Mi eniris internacian Esperanto-medion, starigis multajn kontaktojn kun esperantistoj

el diversaj landoj. Ni parolis komunan lingvon kaj interkompreniĝis bonege!

Mi plu perfektigis Esperanton per korespondado kun miaj novaj amikoj. Mi interesiĝas pri la problemoj de Internacia Lingvo, pri monda paco, amikeco kaj interkompreniĝo. Mi havas grandan interesiĝon ankaŭ pri filozofio, etiko, psikologio kaj parapsikologio kaj vegetaran manieron de nutrado. Mi ofte ekskursas en niaj belaj montoj kaj ĝuas la kontakton kun beleco kaj forto de la naturo. En miaj ekskursoj mi ankaŭ pentras.

Mi jam estas profesia pentristo kaj mi partoprenas ekspoziciojn, kunlaboras al diversaj eldonaĵoj per karikaturaj kaj grafikaĵoj. Eble iun tagon oni organizos internacian ekspozicion de pentristoj-esperantistoj, kiun mi plezure partoprenus.“

Anticipe mi deziras al nia ŝimpatia kunlaboranto sukceson. Kaj nun ni prezentas al vi unu el liaj grafikaĵoj.

Sajne via konatiĝo kun Metodi Angelov efektiviĝis?

D. SIMEONOV



Sen vortoj

69-a Universala Kongreso de Esperanto

Vankuvero (Kanado),
21-28. VII. 1984



LA KONGRESURBO VANKUVERO

Vankuvero estas, laŭ grandeco, la tria urbo de Kanado. La enloĝantoj de Vankuvero konsideras nur Rio de Janeiro kiel rivalon. En la jaro 1886, kiam ĝi fariĝis oficiale urbo, tie loĝis iom pli ol 2 000 homoj.

En la centro de la urbo troviĝas la financaj kaj ekonomiaj institucioj de Brita Kolumbio. Ĝi konsistas el arbaro de nubskrapuloj. La urbon karakterizas grandaj kvartaloj de bele desegnitaj lignaj domoj. Plejmulto de iliaj posedantoj estas bonaj ĝardenistoj, kiuj eluzas la 283-tagan kresko-sezonon.

Vankuvero estas harmonia kombinaĵo de montaro, maroblua akvo kaj griza roko. Tia miksaĵo influas homojn kaj instigas ĉarmon en ili. En Vankuvero pluvas ofte, la mezkvanto estas 1,5 m dum la jaro. En pli malvarma klimato tio farus 5 metrojn da neĝo. Neniu ĉargeniĝas pro la pluvo, al ili plaĉas la pluvo.

En la jaro 1792 angla kapitano Vankuver alvenis per ŝipo kaj ĵetis ankron, kelkajn kilometrojn sude de la nuna urbo kaj komencis esplori la bordon en malgranda remboato. Li skribis: „Ĉi tie ni renkontis ĉirkaŭ 50 indianojn en iliaj kanotoj, kiuj kondutis en fiera maniero kaj donacis al ni kelkajn bolitajn fiŝojn.“

La unua civitano de Vankuvero estas konsiderata kapitano Jack Deighton, kiu establis la unuan drinkejon. Poste li akiris nomon „Gas-Joĉjo“. Ĉirkaŭ lia drinkejo kreskis vilaĝo, kiun homoj nomis „gasurbo“ kaj la nomo eĉ aperis sur la mapoj. Poste ĝi akiris la dignan nomon Vankuvero. En la jaro 1886 la Kanada registaro finis la konstruadon de la fervojo ĝis Vankuvero kaj la kresko de la urbo komenciĝis.

Speciale la evoluon rapidigis la eltrovo de oro en Klondajko (1898). Ankaŭ la malfermo de Panama kanalo, en jaro 1914, multe helpis, kaj la vojo al Eŭropo fariĝis pli mallonga. Kelkajn jarojn poste Vankuvero jam eksportis pli da greno ol Montrealo.

Interesa parto de Vankuvero estas la „ĉina urbo“. Oni pensas, ke de ĉi tie komenciĝis la

tutmonda revolucio de ĉinaj manĝaĵoj. Ĉe la Pender-strato estas ĉirkaŭ 20 ĉinaj restoracioj, du ĉinaj gazetoj kaj diversaj vendejoj. 40 000 ĉinoj vagadas tra la stratoj, babilante, renkontante amikojn, konsumante grandegajn manĝojn kaj ĝenerale ĝuante la vivon. Tio estas la etna Vankuvero.

Vankuvero estas multnacia kaj multrasa. Aperas gazetoj en multaj lingvoj. En Vankuvero loĝas ankaŭ japanoj, multaj italoj kun pelargonioj en fenestroj, grekoj kun iliaj restoracioj. Jugoslavoj prosperas peze laborante, judoj kun malgrandaj magazenoj, norvegoj kaj danoj, kiujn oni nomas svedoj. Skotoj, francoj kaj germanoj kune faras la fandpoton, kiun oni nomas Kanado.

Stanleio-parko estas la sintezo de Vankuvero, 400 hektaroj da natura arbaro, ĝardenoj kaj areoj por diversaj sportoj. La parko estas, preskaŭ tute, ĉirkaŭita de akvo. Eĉ dum vintro, pro la milda klimato, oni povas ludi golfon aŭ tenison. En la centro de la parko troviĝas la zoologia ĝardeno kaj akvario.

Same belan lokon ĉe la marloko Burardo okupas la Universitato de Brita Kolumbio, ĉe Punkto Grejo en la Okcidenta Vankuvero. Pli ol 20 000 gestudentoj studas tie. La universitato estas fama en la kampo de scienco.

K. SMILGA

(El „Heroldo de Esperanto“,
n-ro 4-5, 30. 3. 1984)

ESPERANTO-ELSENDOJ DE RADIO VIENO

Radio Vieno (Aŭstrio) estis inter la unuaj radiostacioj, kiuj disaŭdigis esperantlingvajn programojn jam en 1924. La daŭro de ĝiaj Esperanto-elsendoj estis tre mallonga — proksimume kvaronhoro semajne. Tiam oni parolis pri kursoj, komunikis informojn. Detaloj mankas, ĉar malaperis ĉiuj dokumentoj en la jaroj de faŝisma regado.

Post la Dua Mondmilito ekde julio 1946 Radio Vieno ree enprogramigis E-disaŭdigojn dank' al energiaj penadoj. Ekde tiam la programon kunmetas aparta komitato de la Aŭstria Esperantista Federacio.

Fine de 1973 la tiama federacia kanceliero d-ro Bruno Kreisky dekretis la uzon ankaŭ de Esperanto krom la angla, franca, germana kaj hispana lingvoj en Poreksterlanda Servo sur Mallong-ondoj de Radio Vieno. Nuntempe tiu programo sur mallongaj ondoj estas sola de la radiostacio.

Nia Esperanto-elsendo estas nun **12-minuta** kaj estas aŭdebla **dufoje ĉiun dimanĉon** je la **8.45** horo (bulgara somera tempo) sur 31 m (9770 kHz) kaj sur 49 m (6155 kHz) kaj ripeto je **12.45** horo (bulgara somera tempo) sur 41 m (7170 kHz) kaj sur 49 m (6155 kHz). Adreso: **O. R. F., Esperanto-fako, A-1136 WIEN, Aŭstrio.**

Esperanto-fako de Radio Vieno

VOJAĜIMPRESOJ EL HISPANIO

Kelkaj vojaĝoj al Hispanio ebligis al mi tre bone ekoni tiun interesan landon. Riĉa je mirindaj naturbelaj kaj valoraj historiaj monumentoj el diversaj epokoj, ĝi ĉiam allogis kaj allogas min. Neforgeseblaj restos por mi la hispanaj naciaj E-kongresoj, kiujn mi partoprenis dank' al la afabla invito de Hispana Esperanto-Federacio. La renkontoj kun hispanaj esperantistoj pliriĉigis mian vivon.

Favoraj cirkonstancoj donis al mi plezurigan eblecon denove vojaĝi al Hispanio en la aŭtuno de 1983. Mi partoprenis la 25-an Jubilean Renkontigon de Katalunaj Esperantistoj (19-an Katalunan E-Kongreson — unua post la milito), okazinta de la 29-a de oktobro ĝis la 1-a de novembro pasintjare en urbo Sabadell.

Grava evento enkadre de tiuj katalunaj renkontigoj estas solenaĵo, dediĉita al la belliteratura E-konkurso „Internaciaj Floraj Ludoj“. Laŭ sia regularo tiu konkurso celas evoluigi kaj prestiĝigi prozon kaj poezion en la Internacia Lingvo Esperanto. Jam 23 jarojn partoprenas ĝin diverslandaj esperantistoj — poetoj kaj prozistoj, konkurante per siaj plej valoraj verkoj. Gojo por ni estas, ke kelkaj bulgaraj esperantistoj gajnis premiojn en tiu altnivela konkurso.

Alia okazintaĵo, kiu emociis min, estis la konatiĝo kun fama familio de s-ro Ramon Molera Pedrals el urbo Moya. Mi konis tiun nomon de la E-gazetaro. En mia konscio ĝi estas ligita kun la nocio „kolektado“ — tre ŝatata okupo de multaj esperantistoj. Tamen mi tute ne imagis la amplekson de tio, kion kreis la nobla fervora instruisto Molera.

Liaj familianoj, partoprenintaj la Katalunan E-Kongreson, invitis min gastigi en ilia hejmo. Neniam mi forgesos la tagojn, travivintajn kun tiuj modestaj, sed afablaj kaj gastamaj homoj. Kortuŝis min la sinceraj interrilatoj en tiu vera E-familio. Forte emociita, mi eniris la ejon, kie ĉiam ankoraŭ ĉeestas la spirito de s-ro Molera. Sur skribtablo kuŝas liaj kraĵoj kaj kajeroj, uzataj de li ĝis la lasta spiro. Libroj, revuoj, bultenoj, vortaroj, esperantaĵoj preskaŭ el ĉiuj landoj. Kiom multe da laboro, kiom multe da tempo dediĉita al la ideoj de la Internacia Lingvo! . . . Per propraj financaj rimedoj li kreis altvaloran librokolekton, grandan parton de kiu konsistigas bulgaraj eldonaĵoj.

Mi konvinkigis, ke la kolektitaj de s-ro Molera belliteraturaj juveloj restis en bonaj manoj. Liaj gefiloj daŭrigos lian laboron. La filino, Anna Molera, havas la saman entuziasmon de sia patro. Siaj celoj estas gardi kaj

plibonigi la ordon de la objektoj, pliriĉigi la kolekton kaj vaste informi pri tiu eta muzeo. Si donacis al mi numerojn „0“ kaj „1“ de la revueto „Kolektado“, fondita de Ramon Molera en 1971. Sur iliaj paĝoj estas respegulita la granda amo de s-ro Molera al Esperanto kaj lia espero pri pligrandigo de la sukcesoj en nia E-movado.

La kolektada laboro, farita de s-ro Ramon Molera, estas modelo por ĉiu esperantisto-kolektanto.

LILIJA KOLEVA

AEST'84

Scienca-teknika sekcio de Ĉeĥa Esperanto-Asocio anoncas al siaj membroj kaj al eksterlandaj gekolegoj, ke la tradiciajseminarioj pri apliko de Esperanto en scienco kaj tekniko — aranĝataj en Ĉeĥoslovakio ekde 1978 — estas daŭrigotaj per AEST'84 de la 31-a de aŭgusto ĝis la 2-a de septembro 1984 en la moravia metropolo Brno. La ĉefa temo de la seminario estas „PERSPEKTIVOJ DE LA MONDA NUTRAJ-PRODUKTADO“.

La temo rilatas al unu el la plej aktualaj problemoj de la homaro kaj tuŝas ne nur la tradiciajn nutraĵproduktajn fakojn, kiel ekzemple agrokulturon, bestbredadon k.a., sed ankaŭ multajn aliajn sciencajn kaj teknikajn fakojn, ekzemple kemion (sterkado, kemia plantprotektado, sinteza mangaĵo ktp.), maŝinkonstruadon, medicinon, nutraĵkonservadon, vivomedion, geologion, meteorologion kaj aliajn.

La dua sekcio de la seminario AEST'84 estos dediĉita al problemoj de la faka Esperanta terminologio kaj tradukado.

La prelegoj kaj fakkunvenoj okazos en Sindikata Domo Kultur- kaj Sciencfaka (Klub školŝtvi a vedy) en la moderna parto de la urbocentro. La loĝado estas certigita.


Se vi intencas partopreni — ĉu kun aŭ sen prelego — plenigu provizoran aligilon kaj sendu ĝin senprokraste laŭ la indikita adreso.

Provizoran aligilon al la seminario AEST'84 sendu al:

ing. Zdenek PLUHAR, CS-507 51 HOLOVOUSY v., PODK. 109, Ĉeĥoslovakio. Ĝi enhavu: familian nomon, personan nomon, profesion, akademian titolon, precizan adreson kaj subskribon de la aliginto.

Estu menciita ankaŭ la titolo de la eventuala prelego kaj aliaj rimarkoj.

Doc. d-ro V. NOVOBILSKY, CSc.,
prezidanto de STS-ĈEA



AMPLEKSA GERMANA- ESPERANTA VORTARO

Germana-Esperanta Vortaro (GEV) de Erich-Dieter Krause. Eldonejo Enzyklopädie Leipzig, 596 pg., 1983. Formato 12,5×19 cm. Prezo: 18 GDR-markoj.

Kompare kun la antaŭaj du malgrandaj Esperanto-Germana kaj Germana-Esperanta Vortaroj (1967 kaj 1971), ĉiu el kiuj enhavas ĉirkaŭ 12 000 kapvortojn, la noveldonita GEV enhavas pli ol 40 000 kapvortojn kaj grandan nombron da aldonaj vortkunmetoj kaj parolturnoj. Ĝi estas eble la plej ampleksa tiaspeca vortaro inter la ĝis nun aperintaj nacilingvaj-Esperantaj vortaroj. Krom la baza vorttrezoro pri la ĉiutaga lingvouzo, estas konsiderataj ankaŭ multaj nocioj el la sfero de la scienco, tekniko, politiko, ekonomio, sporto k.a. Nunancoj de iuj signifoj ĉe la kapvortoj estas limitaj unu de la aliaj pere de indikoj pri la sfero de uzo aŭ pere de klarigaj aldonajoj. La vortaro estas kompilita laŭ nesta metodo.

Trafoliumante ĝin, mi kun plezuro konstatis, ke GEV estas fidinda kaj nepre uzenda de esperantistoj, scipovantaj germanan lingvon. En ĝi la bulgaraj esperantistoj kun germanaj lingvokonoj povas trovi multajn vortojn, kiuj mankas en ambaŭ Bulgaraj-Esperantaj Vortaroj (1960 kaj 1981) kaj en Esperanto-Bulgara Vortaro (1963): *gaspedale* (akcelilo en aŭtomobilo), *gastlaboristo* (en okcidenteŭropaj landoj), *gaĝo* (salajro al aktoro), *forktraktoreto* (por stapli/stakigi), *forkigi* (la vojo), *gamaglubolino*, *ranĉo*, *gamelano* (orkestro el insulo Javo), *gasflamigilo* (ne bruligilo!), *saŭno* (skandinava banejo), *kuriero* (ŝakpeco, moviganta sin diagonale), *halfo* („duondefendanto“ en futbalo), *laŭso* (planta senflugila parazita insekto; ne pedikolo!) kaj multaj aliaj. Krome ĉiuj nocioj, rilatantaj al familia stato (geedzeco) estas tre bone klarigitaj. . .

Sed plej interesaj vortoj por mi, kiujn mi renkontis en GEV, estas *slivo* kaj *slivarbo*

(kun ovalaj, blukoloraj fruktoj, el kiuj oni preparas brandon, bulg. „slivovica“; lat. prunus domestica).

Mi trovis nur unu preseraron: sur p. 182, 3-a linio maldekstre supre estas skribite *fünf-eckig* — *kvarangula*, anst. *kvinangula*.

La numeraloj ekde 11 ĝis 19 estas donitaj diversmaniere, ekz.: dek unu, *dekdu*, dek tri, dek kvar, *dekkvin* kaj dek kvin, dek ses, dek sep, dek ok, dek naŭ. Pli korekta estas uzado de disigitaj partoj de tiuj numeraloj, ĉar nur la apartigitaj formoj de la numeraloj de 11 ĝis 19 estas „korektaj“, ĉar sammaniere ni skribas la respektivajn numeralojn (21—29, 31—39 ktp.: dudek unu, dudek du ktp.). La numeraloj *dumil*, *sesmil*, *sepmil*, *dekmil* (la ceteraj mankas!) estas malkorekte skribitaj, ĉar devus esti: du mil, ses mil, sep mil, dek mil — aparte skribitaj!

Sur la lastaj du (nenumeritaj) paĝoj estas E-alfabeto kun klarigoj pri elparolado de vokaloj/konsonantoj, pri akcento, majuskloj kaj nomoj de ne-Esperantaj literoj. La lastaj nomoj estas ege utilaj, ĉar ne ĉiu esperantisto scias kiel nomi tiujn literojn.

Konklude ni povas diri, ke la nova Germana-Esperanta Vortaro estas tre valora kaj utila helpilo por ĉiuj germanlingvanoj-esperantistoj kaj ĉiu el ili devas nepre posedi ĝin.

MARIN BAČEV

KURSO POR TRADUKEMULOJ

De la 17-a ĝis la 31-a de marto k.j. en la Internacia Esperanto-Kursejo en v. Pisanica okazis kurso de tradukarto. La nombro de la akceptitaj kursanoj estis limigita je dudek tradukemuloj el tuta Bulgario. La kurson gvidis la elstara bulgara esperantologo Violin Oljanov. Du semajnojn okupigis la kursanoj pri teorio kaj praktiko de la tradukarto. Oni pridiskutis tradukmanieron de diversaj ĝenroj: informo, artikolo, riporto kaj satira artikolo; sciencaj artikoloj, belarta literaturo k.a.

En la kurso partoprenis ankaŭ kelkaj membroj de TART (Tutlanda Amika Rondo de Tradukemuloj), kiuj estis unuj el la plej spertaj kaj ege helpis nian kursgvidanton. Estis akceptitaj kelkaj novaj TART-anoj.

La atmosfero estis vere amika. Ofte inter la kursanoj okazis multaj interesaj diskutoj.

Ĉiuj kursanoj havis grandan utilon, ĉar ili ekregis multajn interesajn formojn, subtilaĵojn kaj nuancojn de la Esperanta lingvouzo. Pro tio la intereso al tiu novspeca aranĝo estas tre granda ne nur en nia lando, sed ankaŭ eksterlande.

LIBERTARIJA MLADENOVA

FRUKTODONA KONSULTIGO

La 17-a Konsultigo de reprezentantoj de la E-asocioj el la socialismaj landoj ĉi-jare okazis inter la 26-a kaj 31-a de marto 1984 en Bad Saarow, GDR.

Oni pritraktis multajn aspektojn de la E-agado. Unu el la plej gravaj problemoj ne nur por la esperantistoj, sed ankaŭ por ĉiuj homoj estas la problemoj pri paco sur nia planedo. Esperanto kiel kultura fenomeno estas nepensebla sen paco. La sperto, akirita dum la preskaŭ centjara ekzistado de la Internacia Lingvo, konfirmas, ke dum milito la E-movado ne plu aktivis aŭ stagnas. Tial sankta deo de la esperantistaro estas batali per ĉiuj rimedoj por paco.

La nuna internacia situacio estas aparte streĉa pro la instalo de novaj usonaj raketoj en iuj landoj de Okcidenta Eŭropo. Batali kontraŭ la streĉigo de la internacia situacio estas tasko n-ro 1 de la esperantistoj el la tuta mondo. En multaj landoj spontane ekestis iniciatoj, oni apelacias, kolektas subskribojn por paco. La E-asocioj en la socialismaj landoj devas subteni ĉiamaniere kaj stimuli la batalon por paco.

Grava punkto en la tagordo estis la problemoj pri preparo de kadroj, de kiuj dependas la estonto de la E-movado. Pasintjare, dank' al la obstina laboro de BEA, en Varna estis realigita la unua kurso de la Konstanta Internacia Kvalifikejo (KIK) de kadroj, gvidata de internacia konsilio. La partoprenantoj en la Konsultigo donis altan pritakson al la kurso, kiu estas unika en sia speco manifestajo, kaj esprimis sian certecon, ke tiu utila iniciato daŭros plu.

La estonto de la E-movado grandparte dependas de la scipovo pruvi science la utilon de la Internacia Lingvo kaj de la majstreco de la E-instruistoj. Pro tio oni pridiskutis ankaŭ tiujn problemojn. Grandan atenton oni turnis al la strategiaj problemoj de la E-movado en la apartaj landoj — ja oni ne povas atendi bonajn rezultojn sen klara koncepto pri la direktoj de evoluo de la E-movado. Estis tuŝitaj ankaŭ problemoj de la E-junularo. La partoprenantoj en la Konsultigo interŝanĝis informojn pri la antaŭstarantaj aranĝoj dum 1985.

La dommastroj — la E-Asocio de GDR, prizorgis ĉion necesan, por ke la restado de la partoprenantoj en la Konsultigo estu rezultodona kaj agrabla.

Dank' al la farita interŝanĝo de informoj kaj vidpunktoj pri solvo de diversaj aspektoj de la E-agado, la 17-a Konsultigo de la E-asocioj el la socialismaj landoj kontribuos por ankoraŭ pri grandaj sukcesoj de la Esperanto-movado en la socialismaj landoj.

DIMITAR PAPAŬOV

Distrikta Estraro de BEA — Ĥaskovo kune kun la Distrikta Konsilantaro pri Kulturo — Ĥaskovo kaj la Komunuma Konsilantaro — Dimitrovgrad organizas

KONKURSON

pri traduko de verkoj de la poeto-esperantisto Penjo Penev, el la bulgara lingvo en Esperanton.

La konkurso okazas omaĝe al 54-jariĝo de la poeto kaj 25 jaroj depost lia morto, kaj celas popularigi en Bulgario kaj eksterlande pere de la Internacia Lingvo Esperanto la entuziasman poezion de la poeto-konstruanto de nova socialisma Bulgario.

Partoprenkondiĉoj:

1. En la konkurso povas partopreni ĉiuj bulgaraj civitanoj, kiuj bone regas Esperanton kaj posedas la tradukarton.

2. Ĉiuj tradukantoj rajtas partopreni per kelkaj tradukaĵoj, nepublikigitaj ĝis nun en periodaĵoj aŭ aliaj eldonaĵoj en Esperanto.

3. La konkurso estas anonima. La tradukaĵoj estu tajpitaj en du ekzempleroj, kiujn oni subskribu per pseŭdonimo kaj enmetu en grandan koverton. En alian, pli malgrandan koverton la partoprenantoj enŝovu slipon kun la tri nomoj, pseŭdonimo kaj preciza adreso de la tradukanto.

4. La kovertojn kun la konkursaĵoj oni sendu laŭ adreso: 6300 Ĥaskovo, p. k. 68, Ok-raĵno Râkovodstvo na BES (za konkursa). Limdato: 31. 12. 1984 (validas la poŝta stampo).

Premioj:

1. Tradukitaj poemoj: I premio — 300 lv.
II premio — 200 lv.
III premio — 100 lv.

2. Tradukitaj versaĵoj: I premio — 100 lv.
II premio — po 75 lv.
III premio — po 50 lv.

Por pliaj informoj turnu vin al: OR na BES — Ĥaskovo, str. „Otec Paisij“ 23 aŭ tel 2-80-71.

Uzbekaj E-aktivuloj klopodas ordigi kaj kompletigi por eventuala eldono la krea heredaĵo de la vaste konata taŝkenta esperantisto PETRO POLIŠČUK. Tiu-ĉe estas serĉataj ĉiuj liaj originalaj kaj tradukitaj verkoj, disemataj tra la Esperanto-gazetaro kaj privataj leteroj. Ni petas la tutmondan esperantistaron kaj ĉiujn literamikojn de P. Poliŝĉuk sendi originalojn aŭ kopiojn de liaj verkoj kaj korespondadojn al: Vladimir Masalkin, massiv Junusabad, kvartalo 8, domo 13, kv. 28, SU-700093 TAŜKENT-93, Uzbekistan, USSR.



LA FONTAINE

KOLOMBINO KAJ FORMIKO

(fablo)

Iu soifanta blankpluma kolombino trempis sian bekon en la klaran torenton, kiam formiko falis de branĉo en la akvon.

La kolombino vidis la formikon, kompatis ĝin kaj, starante sur la bordo, etendis al ĝi herbotrunketon.

— Mi dankas al vi, kolombino! — per mal-dika voĉeto diris la formiko. — Mi neniam forgesos vin!

Sed la kolombino eĉ ne aŭdis tiujn dankvortojn, ĉar ĝi tuj forflugis. Ĝi sidiĝis sur iu branĉo, kiu speguliĝis en la torento, kaj restis senmova, tre ĝoja, ĉar estis farinta bonan agon.

Iu petolulo, vidinte la kolombinon, senbrue proksimiĝis al la arbo kaj streĉis sian ĵetilon por frapi per ŝtono la belegan birdon, kiu ne rimarkis la danĝeron. La eta formiko tamen vidis ĉion kaj tuj mordis la knabon je la kalkano.

— Oh! — li krietis kaj ellasis la ĵetilon.

La kolombino forflugis alte ĉielen, sed ankaŭ de tie aŭdiĝis la vortoj de ĝia kanto: „Ho, kiel argable estas fari bonon!“

Esperantigis: MARIA VAKASINSKA

INFANA PENTROARTO EL ASENOVGRAD



„Maskitoj“



„Artamatorinoj“

ENIGMOJ

En pampo ege malproksima
loĝas besto stranga, bonanima,
kun antaŭaj kruroj tre mallongaj,
kaj kun postaj — trioble pli longaj.
Fuĝas ĝi pro kiu ajn minaco,
al la bestoj tenas sin en paco.
En poŝet' surventra ĝi transportas
la idaron, tiel ĝin ĝi portas.
Tiu best' ne loĝas en Eŭropo.
Kiu estas ĝi?

(Makropo)



Flugas mi, sed birdo mi estas,
de la ov' devenas, sed ne nestas,
flirtas mi libere en aero,
kaj ripozi sidas mi sur tero.
Infanaĝe dormas en kokono,
aŭskultante eĉ nenium sonon.
La infanoj min tenere amas,
post mi kuri gaje ili ŝatas.
Kio estas tio?

(Papilio)



Tord-vosteton, oreletojn
havas mi kaj kvar kruretojn.
Loĝas mi en keloj, domoj,
sed mi kaŝas de la homoj.
Ŝteli nokte mi preferas,
la taglumon ne toleras.
Al lipharoj vi ne miru
kaj... al kat' pri mi ne diru!
Kio estas mi?

(Museto)



NOVA ESPERANTO-SOCIETO

En marto k.j. en la „koro de bulgara energetiko“ — urbo Radnevo, distrikto de Stara Zagora, laŭ iniciato de la Komunuma Komitato de BKP estis fondita E-societo „Trakia Stelo“.

Gastoj de la fonda kunveno estis Petko Bonev, Todor Dinov, membroj de la Komunuma Komitato de BKP, kaj dezirantoj lerni la Internacian Lingvon. La kunvenon gvidis Ivan Georgiev — reprezentanto de la Komunuma Komitato de BKP — Radnevo. La intenco fondi E-societon en la urbo estis varme subtenita de ĉiuj ĉeestantoj.

E-societo „Trakia Stelo“ klopodos pri sukcesa ekposedo de Esperanto. Per ĝi ni popularigos la socialisman supreniron kaj belecon de nia Patrolando kaj gajnos novajn amikojn de Bulgario.

STEFKA GANĈEVA

E-SOCIETO „VERDA TRAMO“

En gazeto „Transporta Fajrero“, n-ro 7 de la 3-a de aprilo 1984, ni legis, ke en februaro ĉi-jare estis fondita E-societo „Verda Tramo“ de la laboristoj el la urba transporto. Kiel prezidanto de la nova societo estis elektita Lasto Nikov.

La intereso al Esperanto havas certajn tradiciojn inter la laboristoj kaj oficistoj de la Sofia Urba Transporto. Antaŭe ankaŭ aktivadis esperantista societo de sofia transportlaboristoj, la tramkondukistoj Beljo Velev, Milčo Avramov kaj Georgi Petrov estas konataj kiel fervoraj adeptoj de la ideo pri amikeco kaj kunlaborado inter la popoloj per Esperanto.

Al la nova societo ekfunkciis kurso por instruado de Esperanto, kiun gvidas Lasto Nikov. Post trimonata lernado la kursanoj ricevos diplomojn. La ekposedo de la Internacia Lingvo ebligas al ili interesajn konatiĝojn, partoprenon en la aranĝoj de BEA.

Krome, estas lanĉita ideo pri fondo de E-klubo ĉe la Sindikata Kulturdomo de Laboristoj en la Sofia Urba Transporto.

La membroj de la nova societo partoprenis la Internacian Kongreson de IFEF, okazintan en majo ĉi-jare en Slânĉev Brjag.

La redakcio de „Bulgara Esperantisto“ bondeziras al la nova societo sukcesojn en ĝia estonta laboro!

DISTRIKTA KONFERENCO DE BEA EN PLEVEN

La 29-an de marto k.j. en Pleven okazis Distrikta Konferenco de BEA.

Lernantoj-esperantistoj el lernejo „Stojan Zaimov“ sub la gvido de la instruistino Genoveva Ranĉeva prezentis entuziasman recitalon. Virina ensemblo el esperantistinoj el laborista E-societo „Mizio“ — Pleven, plenumis belartan programon.

Pantelej Gospodinov, sekretario de DE de BEA — Pleven, malfermis la Konferencon. Gastoj estis Stefka Ĉenkova de CE de BEA — Sofio kaj Vâlкова de Komunuma Komitato de BKP — Pleven.

Priagadan raporton pri la periodo 1982—1983 faris d-ro Emilija Kanjovska, vicprezidanto de la Distrikta Estraro. Dank'al la subteno de Distrikta kaj Komunuma Komitato de BKP — Pleven, la E-movado en Pleven eniris pli profunde la socian vivon. La distrikta E-organizaĵo sekvis la partiajn programdokumentojn kaj Kompleksan Programon de CE de BEA.

Estis organizita amasa lernado de Esperanto per kursoj. En sep lernejoj oni aranĝis fakultativan instruadon de la Internacia Lingvo. Kreiĝis metodika grupo de instruantoj de Esperanto. Ili estis senditaj por perfektigo en la Internacian E-Kursejon en Pisanica. Pleven estis dommastro de la 15-a Nacia Revuo de E-Parolo kaj Kanto kaj de Nacia Junulara Renkontiĝo. Esperantistoj el Pleven kaj ties distrikto partoprenis en naciaj konferencoj en Sumen kaj Veliko Târnovo, en la Tagoj de Esperanta Kulturo en Sofio, en renkontiĝoj de medicinistoj-esperantistoj.

Sukcese estis organizita la Internacia Junulara Esperantista Laborbrigado en 1983 en v. Pobeda, distrikto se Pleven. Oni partoprenis agrikulturajn laborojn en Brut-Breda Farmo „Georgi Dimitrov“.

Mastruma helpagado komenciĝis en 1981 kaj plu evoluas sukcese. Gi entute fincas la E-aktivecojn en Pleven-distrikto.

Okazis vigla diskutado pri la agadraporto. Siajn vidpunktojn kaj opiniojn eldiris Dimităr Dimitrov, Katja Viĉeva, Ivan Doĉev, Pantelej Gospodinov, Angel Simeonov, Dimităr Georgiev. La parolon prenis ankaŭ la gastoj. Fine Venecij Georgiev, prezidanto de DE de BEA — Pleven, pritraktis ĉiujn eldirojn.

La akceptitaj decidoj en la spirito de partiaj postuloj estas garantiĝo, ke la esperantistoj el Pleven-distrikto estos en la unuaj vicoj de la batalo por daŭra paco kaj malstreĉiĝo.

DIMITĂR KAMENOPOLSKI

SUKCESA METODIKA SEMINARIO EN HASKOVO

En decembro pasintjare en Haskovo okazis unutaga Distrikta Metodika Seminario kun instruistoj de Esperanto. Ĉeestis 10 geinstruistoj el Haskovo, Harmanli, Dimitrovgrad kaj Ljubimec.

La Seminarion malfermis la prezidanto de la Distrikta Estraro — Haskovo kaj E-lektoro inĝ. Nikola Uzunov. Li prezentis al la seminarianoj enkondukan prelegon „La instruado de Esperanto — kia ĝi estu?“. En ĝi Uzunov donis gravajn metodikajn konsilojn al la instruantoj.

Nikola Pilev, multjara kaj sperta E-instruisto, prezidanto de E-societo „Prof. d-ro Asen Zlatarov“ — Haskovo, parolis pri iuj instrumentoj — prononcado kaj adopto de bonstila Esperanto-parolado.

Pri novaj modernaj instrumentoj de Esperanto kaj aliaj fremdaj lingvoj prelegis inĝ. Blagovesta Uzunova, multjara E-instruistino. Ŝi prezentis interesajn didaktikajn metodojn.

Fine N. Uzunov faris modelan lecionon kaj donis praktikajn konsilojn al la geinstruistoj.

Tiu ĉi unua Distrikta Metodika Seminario, organizita de DE de BEA — Haskovo, estis presukcesa. Oni proponis, ke metodikaj seminarioj por E-instruistoj okazu en la distrikto foje aŭ dufoje en la jaro.

BLAGOVESTA UZUNOVA

ZAMENHOFA VESPERO

La 13-an de aprilo k. j. en la Kulturdomo de Transportaj Laboristoj — Stara Zagora, fervojista societo „Fervojisto“ kaj urba societo „Verda Stelo“ solene celebris la 67-an datrevenon depost la morto de L. L. Zamenhof. Ĉeestis ĉirkaŭ 50 membroj el ambaŭ societoj. Ĉeestis ankaŭ inĝ. Petko Bonev, prezidanto de DE de BEA — Stara Zagora, kaj urbanoj.

Estis prezentita belarta programo. Iljana Petkova, 8-jara esperantistino, deklamis la versaĵon „Printempo“. Folkloro grupo el „Verda Stelo“ plenumis kelkajn kantojn. Sian versaĵon „La verda raketo“ recitis Nejko Kunev, membro de la urba societo.

Pri la vivo kaj agado de Zamenhof parolis Todor Dimov Todorov, instruanto ĉe societo „Fervojisto“.

Enĉo Mitev, prezidanto de societo „Fervojisto“, bonvenigis ĉiujn gastojn kaj ĉeestantojn kaj bondeziris al ĉiuj aliĝintoj al la 36-a Kongreso de IFEF sukcesan partoprenon.

Sekvis amuza parto kun dancoj.

STEFAN RUSANOV

CELEBRO DE HEROOJ-KONTRAŬFASISTOJ

En marto k. j. okaze de la 40-jariĝo de la socialisma revolucio en Bulgario E-societo „Nova vojo“ — Pernik, okazigis solenan memorkunvenon pri la pereintaj herooj-kontraŭfasistoj Ivan Garvanov kaj Evlogi Agajn.

Junpioniroj el ESPU „Lenin“ — Pernik, venigitaj de sia direktoro Marica Popova kaj instruistino Kirilova, prezentis belartan muntaĵon el patriotaj verkoj. Galina Bojičkova, sesjara knabineto, deklamis versaĵon „Forestis la herooj“ kaj estis tondre aplaŭdita de la publiko.

La 20-an de marto k. j. E-grupo, kune kun aliaj organizaĵoj metis florkronon ĉe la monumento de Ivan Garvanov.

NIKOLA MITEV

„VERDA RAKETO“ KUN PLEJ RIĈA REKLAMARO

La lernejana Esperanto-societo „Verda Raketo“ estis fondita la 4-an de oktobro 1962. Por ĝia aktiva agado multe helpis la 19-a TEJO-Kongreso, okazinta en Vraca.

Nuntempe „Verda Raketo“ havas versajne la plej riĉan Esperanto-reklamaron. Kun nia emblemo ĝis nun estas produktitaj:

— alumetskatoj	— 5 000 000;
— kalendaretoj	— 10 000;
— insignoj	— 10 000;
— propagandaj markoj	— 100 000;
— leterkovertoj	— 10 000;
— glumarkoj	— 10 000;



— sportaj flaneletoj	— 1 000;
— plastaj tekoj	— 15 000;
— vitraj glasoj	— 1 000;
— ĉokoladoj	— 1 000 000.

Ĉu aliloke, krom en Vraca, ekzistas tiel riĉa Esperanto-reklamaro?

БОЈКО МЛАДЕНОВ

INTERNACIA JUNULARA ESPERANTISTA LABORBRIGADO

Ankaŭ ĉi-jare de la 1-a ĝis la 20-a de aŭgusto en v. Pobeda apud Pleven okazos **Internacia Junulara Esperantista Laborbrigado „Cvetan Spasov“**. Ĝi estas organizata sub la aŭspicio de Distrikta Komitato de la Komsomolo — Pleven, de la Junulara Sekcio de BEA kaj la redakcio de revuo „Bulgara Esperantisto“.

La partoprenantoj en la Brigado estos engaĝitaj en diversspecaj agrikulturaj laboroj — ter- kaj plantkulturado, ĉe favoraj labor- kaj loĝkondiĉoj. Oni laboros de la 7-a ĝis la 14-a horo. La laboro estos pagata laŭ la koncernaj labornormoj.

Dum la Brigado oni okazigos diversajn aranĝojn: vizitoj al vidindaj historiaj kaj kulturaj objektoj en Pleven-distrikto kaj en aliaj partoj de la lando, koncertoj kaj amuzprogramoj, okazos naciaj kultur- kaj amuzvesperoj k.a.

Tranoktado, manĝado kaj veturkostoj en Bulgario estos senpagaj.

Por pli da informoj turnu vin al: **Internacia Junulara Esperantista Laborbrigado „Cvetan Spasov“, str. „Canko Cerkovski“ 14, BG-5800 Pleven, Bulgario.**

TRADICIA ARANGO EN ORJAHOVO

La 6-an de marto k.j. en Orjahovo okazis nia tradicia E-arango. Ĉeestis la gvidantoj de V kvartalo de Patrolanda Fronto kaj multaj civitanoj. Gasto el Vraca estis Bojĉo Mladenov.

Infanoj kaj lernantoj el la gimnazio prezentis belartan programon. Poste ili ricevis „maritenici“.

NADEJDA BOSAŠKA



Sur la foto: Infanoj deklamas versaĵon „Avino Marta“ en Esperanto en la tradicia E-arango.

KONCIZAJ KOMENTOJ

HASKOVO

Utila arango por plialtigo de la metodika majstreco de la instruantoj en Haskovo-distrikto — tiel koncize oni povas karakterizi la komunikon. Impresas la fakto, ke tie oni pri-traktis ordinare subtaksatan demandon — pri la respondeco de la instruanto kiel kreanto de novaj esperantistoj.

Estus bone, se la DE de BEA — Haskovo, aŭ iu alia DE denove pridiskutis la saman temon, ekz. en plenkunsido — pri la organizaro de la instruantoj, la homoj kun plej granda aŭtoritato antaŭ la estontaj esperantistoj, kaj starigus al la E-societo konkretajn taskojn pri la laboro kun ili.

Cetere, ni esperas ricevi informon pri aliaj DE, manifestintaj iniciaton pri transformo de la instruantoj en kreantojn de novaj esperantistoj.

HASKOVO

Denove Haskovo — ĉi-foje kiel organizanto de konkurso pri traduko de verkoj de Penjo Penev. La iniciato estas bona kaj kontribuos por plimultiigi la nombron de tradukitaj verkoj el bulgara poezio en Esperanton.

Profitante la sperton de aliaj DE, anoncintaj similajn konkursojn, ni rekomendas al DE de BEA — Haskovo, persone turni sin al apartaj E-kreantoj en la lando, kun propono partopreni la konkurson.

ORJAHOVO

Revivigita malnova formo — esperantista amuza vesperkunveno en marto. Sur la foto vidiĝas infanoj, kiuj deklamas en Esperanto. Sesa laŭvice simila arango — tio jam estas tradicio, meritanta ĉestimon.

Ni bondeziru al ni pli multe da tiaj ĉarmaj solenaĵoj!

Impresas, ke en la diversaj aranĝoj oni ĉiam donas lokon al belartaj programoj, kiuj kreas emocian etoson kaj en kiuj plimultas gelerantoj. Tiel estos realigita ilia pli facila transiro al la E-societoj, al kiuj ili estas natura kompletigo.

PERNIK

Sur la korespondado el Pernik la ĉefredaktoro skribis: „Ni publikigu ĝin, se ne estos malfrue“.

Kvankam ĝi malfruigis, mi petis, ke ni donu okon al ĝi. Ja 1984 estas jubilea — pleniĝas 40 jaroj de la socialisma revolucio en Bulgario. La redaktoro plenumis mian peton kaj jen vi povas legi pri honorigo fare de la E-societo al du pereintaj esperantistoj-kontraŭfaŝistoj.

La jubilea jaro ebligas al ni ankoraŭfoje kliniĝi antaŭ la heroaĵo de la batalantoj por popola libero. Ekskursoj, marŝoj al partizanaj memorlokoj, solenaĵoj — la formoj estas diversaj, sed la celo estas rememorigi la nomojn de la pereintoj en la kontraŭfaŝisma batalo.

RADNEVO

Gojiga sciigo el Radnevo — nova E-societo fondita. Niajn gratulojn! Ni deziras al ĝi „mal-lumigi“ la gloron de la E-societo en Gâlâbovo (en la sama distrikto), kiu antaŭ nelonge celebris sian 10-jaran jubileon.

Ni rekomendas al la nova societo tuj sendi sian fondprotokolon kun la subskriboj de almenaŭ 5 fondintoj kaj sian adreson al CE de BEA, por ke ĝi estu registrita kiel regula societo de BEA kaj ricevadu ĉiujn materialojn rilate la agadon de la E-societoj.

DIMITĀR PAPAŖOV

TRA LA GAZETARO

EN SOFIO:

En la semajna gazeto „Anteni“ (11. 4. 1984) la ĵurnalisto Kalina Kaneva aperigis grandan trikolumnan artikolon sub titolo „Laŭ la postsignoj de la malnovaj leteroj“. Ŝi detale rakontas pri la korespondado de germanaj laboristaj esperantistoj kun bulgaraj amikoj dum la jaroj de kruela nazia teroro.

La loka fervojista ĵurnaleto „Ĵelezniĉarska Tribuna“ („Fervojista Tribuno“, 11. 4. 1984) aperigis informon pri sukcesa kurso en fervojriparejo en Sofio.

EN LA PROVINCO:

Ĵ. „Borba“ — urbo Veliko Tarnovo, en sia memstara monata eldono „Svetlik“ (31. III. 1984) donas lokon al ampleksa artikolo de Olga Cankova pri la Esperanta agado de d-ro Vârban Genĉev, pereinta en la batalo kontraŭ faŝismo.

En ĵ. „Kubratski Zov“ — urbo Kubrat (14. III. 1984) Anton Antonov, prezidanto de la loka E-societo „Progreso“, rakontas pri la vastaj internaciaj liĝoj de la societanoj.

Lige kun la kreado de dokumenta filmo pri la vivo kaj agado de la elstara bulgara kontraŭfaŝisto-esperantisto kaj publicisto TRIFON ĤRISTOVSKI ni petas pri kontribuadoj. Ni bezonas skribimpresojn, leterojn, fotojn, poŝtkartojn kaj aliajn materialojn de tiuj, kiuj konis lin, korespondis aŭ kunlaboris kun Ĥristovski. Estas bonvenaj ankaŭ viaj opinioj pri lia aperinta en Esperanto libro „Mia vivo“. Adreso: CE de BEA (filmo pri Ĥristovski), bul. „Ĥr. Botev“ 97 BG-1303 SOFIO, Bulgario.

La aliaj pri ni

Nia kunlaboranto Boris Andreev el Smoljan havas multajn korespondantojn en diversaj landoj. Al iuj el ili li sendis apartajn kalendarojn de „Bulgara Esperantisto“. Kaj jen estas la resono:

S-ro Maurice Moindrot — Les Aix d'Angillon, Francujo: „Bulgara Esperantisto“ informas min pri via E-movado. La koloraj kovriloj montras al mi vidaĵojn de via bela lando. La kalendaro pri Georgo Dimitrov informis min pri la vivo de fama patrioto de via lando“.

Kurt Langer — Dresden, GDR: „Kun granda intereso mi legis „Bulgara Esperantisto“. Tre multe plaĉis al mi la artikolo pri la internacia Esperanto-Kursejo en Pisanica“.

Irena Georgila — Ateno, Greklando: „Kun granda ĝojo mi legis „Bulgara Esperantisto“. En ĝi mi trovis tre interesan enhavon kaj multajn novaĵojn pri la bulgara E-movado“.

Brigitte Raabe — Staaken, GDR: „Mi treege dankas por la numeroj de „Bulgara Esperantisto“, kiujn vi sendis al mi. Estis tre interesaj por mi — speciale la informoj pri Pisanica, ĉar mi intencas partopreni venontan someron E-kurson“.

Michel Paquis — Sermaiz les Bains, Francujo: „Por mi „Bulgara Esperantisto“ estas interesa legaĵo. Tiu organo de Bulgara Esperantista Asocio enhavas multajn instruajn artikolojn kaj estas vera spegulo de la vivo de bulgara esperantistaro. Do, ankoraŭfoje multan dankon!“

D-ro Kâlmân Buday — Budapeŝto, Hungario: „Kun granda ĝojo mi dankas por revuo „Bulgara Esperantisto“, kiun vi sendis al mi. Al mi estas tre agrable konatigi kun la bulgara E-movado“.

Karla Achour — Monastir, Tunizio: „Mi tre dankas al vi por revuo „Bulgara Esperantisto“, kiu multe plaĉas al mi“.

Eugeni Jnokajtiene — Seta, Litovio, USSR: „Mi elkore dankas vin pro sendaĵo de revuo „Bulgara Esperantisto“. Kun granda ĝojo mi legis la numerojn. Al mi tre plaĉas ĝia enhavo, mi trovis interesajn problemojn pri bulgara Esperanto-movado“.

Margaret Förster — Falkenstein, GDR: „Mi ricevis sendaĵon de E-revuo „Bulgara Esperantisto“. Pri tio mi tre ĝojas kaj dankas al vi tre kore. Jam mi legis multe la revuon kaj ĝi tre plaĉas al mi. La enhavo estas tre interesa.“

Mi mendis „Bulgara Esperantisto“ ĉe nia poŝtejo kaj mi tre ĝojos, se mi ricevos ĝin en 1984“.



DEZIRAS KORESPONDI

BULGARIO:

Venceslav Dobrev (17-jara) — str. Tvârdica 9, BG-8600 Jambol
Jordanka Ivanova (instruistino) — str. Dimitâr Ivanov 15, BG-5000 Veliko Târnovo — kun gekolegoj.
Totka Stefanova (38-jara vidvino, ekonomiistino) — BG-5500 Loveč, bl. 201, vh. A, ap. 5 — kol. sapojn, insignojn, bk, pm.
Mariana Stajkova (19-j. lernantino) — kv. Svoboda, bl. 20, vh. A, BG-8200 Pomorie — pri poezio, muziko, lingvoj; kun ĉl.
Valeri Ivanov (24-jara) — str. Pârvan Gavrilov 6, ap. 3, BG-3400 Mihajlovgrad — kun ĉl pri moderna muziko; kol. bk, pm, insignojn kaj antikvajn monerojn.

ĈEĤOSLOVAKIO:

Marie Hotova (24-j. f-ino) — ul. Dacičkého 569, CS-73401 Karviná 4 Raj — pri literaturo kaj naturo.
Sovčiková Miriam — ul. P. Jilemnockého 8, CS-96681 Zarnovica.
Mazuhová Mária — ul. Tatranská 8, CS-96681 Zarnovica.

HUNGARIO:

Benčatová Tatiana — ul. Fr. Krála 29/34, CS-96681 Zarnovica.
Procková Mária — ul. Hviezdoslavova 14, CS-96681 Zarnovica.
Dajka Jánosné (23-j. s-ino) — Tatabánya 3, PF. 367, H-2803 — kun knabinoj kaj familioj; pri veturoj, gastado.
Mikita Elvira (19-j. f-ino) — Kiss János u. 34, H-7631 Pécs.
Agnes Péterfi (18-j. lernantino) — Gárdonyi u. 10, H-7200 Dombóvár — kol. bk, pm, kalendaretojn.
Erzsébet Miskolczy (12-j. lernantino) — Akadémia krt. 32, v/42, H-6000 Kecskemét — kun samaĝuloj el ĉl.
Fazekas Antal (26-j.) kaj la edzino Katalin (23-j.) — Magyarország Enes, Vöreöshadsereg u. 9, H-9143 — kun bulgaroj, pri literaturo, muziko, sporto, filatelo, politiko, pacmovado.
Gyözö Bedegi (36-jara) — Kemeroovo krt. D/4, C. lh. fsz. 2, H-3100 Salgótarján — pri literaturo, religio, interŝ. librojn kaj gramofondiskojn, eblas reciproka gastado.

POLLANDO:

Diversaĝaj, diversprofesiaj polaj geesperantistoj dez. kor. kun bulgaraj samideanoj. Komuna adreso: Danuta Kozłowska, Al. Niépädleglosci 651/2, PL-81 855 Sopot.

EHNAVO

* * Estu ĉiam la suno!	II
* * Esperanto kaj infanoj	I
St. SEDJANKOV. „Li lasis la unuan spuron“	2,3
D. PAPAŖOV. Tribuno de laboristoj-esperantistoj	3,4
D. KAMENOPOLSKI. Momentoj el la historio de Esperanto en Pleven	4,5
VI. JELEV. Brajlaj kaj sonbendaj E-eldonoj en Bulgario	5,6
D. SIMEONOV. Konatigu: Metodi Angelov — pentristo	7
K. SMILGA. La kongresurbo Vankuvero	8
* * Esperanto-elsendoj de Radio Vieno	8
L. KOLEVA. Vojaĝimpresoj el Hispanio	9
Doc. d-ro V. NOVOBILSKY. AEST'84	9
M. BACEV. Ampleksa Germana-Esperanta Vortaro	10
D. PAPAŖOV. Fruktdona konsultigo	11
* * Infana paĝo	12
* * Enlanda movado	13,14,15
D. PAPAŖOV. Koncizaj komentoj	15,16
* * La aliaj pri ni	16
* * Tra la gazetaro	16
* * Deziras korespondi	III
* * Distroj	IV

Weronika Kuriata (32-jara) — ul. Dzierzynskiego 38 bm. 3, P-82 300 Elblag — pri arto, muziko, modo, lingvoj, trikado; kun ĉl; kol. bk, pm, ilustr. gazetojn.
Barbara Dabrowska (32-j. oficistino) — ul. Barona 17/1, P-82 300 Elblag — pri literaturo, historio, arto muziko, modo, turismo, kun ĉl; eblas reciproka gastado.
38 geklubanoj (10—14 jaraj) serĉas leterkontaktojn kun ĉl. Ili interesiĝas pri muziko, lumbildoj, turismo, surbendigoj. Respondo certa. Komuna adreso: E-klubo, PL-67 240 Kotla.
Ryszard Balicki (16-jara) — Grochowice 24, PL-67 240 Kotla — kun ĉl pri historio, muziko, libroj, turismo, filatelo.

SOVET-UNIO:

6 gelernantoj el SU-295540 Zakarpatskaja obl., Vinogradovo:
Keresztyén Gabriella (12-j. knabino) — str. 50 jara Oktobro 6/32.
Gajdos Viktória kaj Nadja (12—13-j. knabinoj) — str. Vajda 2.
Kovács Katalin (12-j. knabino) — str. 50 jara Oktobro 2/32.
Milován Andrea (12-j. knabino) — pl. Lenina 26.

Sur la unua kovrilpaĝo:
Junia pluvo — foto: E. Kirilova

Ĉefredaktoro: Dončo ĤITROV
Vicĉefredaktoro: Ĥaim LEVI
Respondeca sekretario: Lidia RAEVA
Redakta komitato: Marin BACEV, Vasil BOROVANSKI, Radoslav DOJĈINOV, prof. d-ro Kiril POPOV, Dimitâr ĤAĜIEV, Krâstju KARUCIN
Administranto — ASEN JOSIFOV

Revuo „Bulgara Esperantisto“ — fondita en 1919, distingita per ordeno „Cirilo kaj Metodjo“ — I grado. Eldonkvanto 6500 ekz.
Adreso de la redakcio:
„BULGARA ESPERANTISTO“
Bul. Ĥristo Botev 97, P. K. 66
1303 Sofio, Bulgario
tel. 31-70-19 1 000 Sofio
Ŝtata presejo „Georgi Dimitrov“, bul. Lenin 117

diStroj

ANEKDOTOJ PRI GABROVANOJ

LI PAGAS

Tri amikoj eniris restoracion. Dum du el ili lavis al si la manojn, la tria, kiu estis gabrovano, rapide prenis la manĝokarton kaj forstrekis el la menuo ĉiujn pli multekostajn pladojn.

Al la mirigita kelnero li klarigis: „Ĉar hodiaŭ mi devas pagi la konton. . .“

SENPAĜA KONSILLO

Esperante ricevi senpagan kurackonsilon, gabrovano haltigis surstrate sian najbaron-kuraciston kaj demandis:

— Kara doktoro, kion vi faras, kiam vi havas nazkataron?

— Mi ternas — respondis la kuracisto, kiu same estis gabrovano.

EN LA MAGAZENO

— Ĉu mi ne perdis en via magazeno 10 levojn

— Ne.

— Serĉu atente, mi petas, kaj se vi trovos la monon, redonu ĝin al mi.

— Kaj se mi ne trovos ĝin?

— Tiam vi redonos ĝin alifoje.

TELEGRAMO

Studento-gabrovano elspezis la monon antaŭ la fino de la monato kaj sendis telegramon al sia patro en Gabrovo: „Monon. Via filo.“

Responde la patro telegrafis: „Bastono. Via patro“

DIALOGOJ

— Mi katastrofis kaj mia edzino min forlasis.


— Ĉu pro la aŭtomobilo?

— Ne, pro la virino en la aŭtomobilo. . .

* * *

— Cu vi ne lumigos kandelon?

— Ne, mi al kutimiĝis preĝi en mallumo. . .



Eksterleĝa amuziĝo

Movoj de kavaliro

★	L A S,	N I	N E
O,	P I	L A S	S O
S E D	K O N	V O	K O N
L A S	S I	H E L	K A J

Komencante per la silabo O (nigreta), kaj laŭ la kavalira movo en la ŝakludo, trovu konatan proverbon.

SUPO EL LITEROJ

T	R	E	K	R	U	R	O
O	O	F	I	N	E	I	R
P	A	R	T	O	N	S	A
R	O	T	U	L	F	I	T
A	R	H	I	B	I	L	I
H	T	A	S	O	M	K	G
P	I	A	N	O	L	A	E
E	C	I	A	T	E	I	T

Tiu ĉi kvadrato, plena de literoj, enhavas ses nomojn de muzikiloj. Serĉu ilin! Por la celo vi povas legi horizontale, vertikale kaj eĉ diagonale — en ambaŭ direktoj, sed ne transsaltu literojn.